



3\* 1991\*144

# STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO




Olomouc, 11. - 17.5.1991

## Novaj poŝtaj stampoj pri Esperanto

Poŝtoŝtampo Strážnice, distr. Hodonín, uzadis ekde 15 04 19991 plu an novan E-afrankmaŝinstampilon kun ĉeĥa teksto por propagandi 43-an IFEF-kongreson en Olomouc. En la vico temas jam pri 4-a porokaza afrankmaŝinstampilo en kaj pri Esperanto uzita ĉe menciita poŝtoŝtampo Strážnice:

43. meĉnáródní kongres  
OLMOUC  
1661 s. n. l. n.  
esperantistů telegrafická



Dum la menciita kongreso uzadis ankaŭ la poŝtoŝtampo Olomouc 2 rekte en la kongresejo porokazan E-maŝinstampilon, vidu la apudan bildon.

Ambaŭ menciitajn kliŝetojn projektis ing. a. h. Karel Kuča kaj gravuris ilin s-ro Karel Pavlíček el Praha. Ili estas ankoraŭ akireblaj ĉe la adreso:

ESPERANTO, poŝtkesto 34, 696 62 Strážnice.

-vha-

43-a IFEF kongreso  
OLMOUC  
11. 17. 5. 1991  
ČEĤOSLOVAKIO



## La 43-a kongreso de IFEF

En la semajno 11.-17.5.1991 okazis en la mezmoravia metropolo Olomouc la plej grava Esperanto-evento en Ĉeĥoslovakio en 1991. Kongresis tie preskaŭ 400 esperantistoj-fervojistoj el Aŭstrio (10 personoj), Belgio (6), Britio (3), Bulgario (6), Ĉeĥoslovakio (70), Ĉinio (1), Danlando (10), Francio (50), Germanio (39), Hispanio (33), Hungario (36), Italio (35), Jugoslavio (14), Nederlando (7), Norvegio (6), Pollando (43), Rumanio (4), Svedio (4) kaj Svislando (4). La antaŭkongreso okazis en Prago kaj la postkongreso sekvis en Žilina.

Jam sabate antaŭ la kongreso efektiviĝis gazetara konferenco kun lokaj ĵurnalistoj kaj posttagmeze bonvenigo de kongresanoj alvenantaj en Viena trajno en la stacidomo kun folkloro muziko. Dum la interkona vespero e-ano Rýznar prezentis sian "magian" arton.

La dimanĉan programon malfermis katolika meso kaj ekumena diservo (ambaŭ en la preĝejo de Sankta Maria la Neĝa) sub gvido de pastro Pavel Řiřica, dominikana prioro en Olomouc, kaj pastro Adolf Burkhardt el Germanio, prezidanto de KELI, kun aktiva helpo de Miloslav Švaček (IKUE) kaj Pavel Polnický (KELI). La violonon ludis Miroslava Doležalová, membrino de Moravia filharmonio.

Post la diservoj la kongresanoj kolektiĝis sur la placo antaŭ la urbodomo kaj kun ĉielblue vestitaj blov-orkestro kaj "majorinoj" parade marŝis tra la urbo al parko kun Esperanto-arbo plantita en 1932 okaze de la 5-a Ĉeĥoslovaka Esperanto-kongreso.

Tagmeze la kongreso estis solene inaŭgurita en la kongresejo de la kulturdomo Sigma. Vicprezidanto de LKK František Svoboda prezentis la gastojn: Václav Stareček (vicdirektoro de ĈSD), Vojtěch Knop-Kostka (distrikta direktoro de ĈSD en Olomouc), Gilbert Schmit (ĝenerala prezidanto de FISAIC), Oszkar Princz (komitatano de UEA), Ivan Foltýn (prezidanto de la distrikto), Milan Hořínek (urbestro de Olomouc). Poste estis prezentitaj la estraranoj de IFEF: Per Engen (prezidanto), Romano Bolognesi (sekretario), István Gulyás (vicprezidanto), Henning Hauge (kasisto) kaj E. Henning Olsen (redaktoro de IF).

En la enkonduka parto de la programo esprimis la gastoj kaj landaj reprezentantoj siajn salutojn. La prezidanto de LKK kaj de ĈEA Petro Chrdle prezentis novajn honorajn membrojn de ĈEA, el kiuj du ĉeestis (Marie Bartovská kaj Vladimír Mohapl), kaj la prezidanto de IFEF Per Engen anoncis, ke IFEF nomumis novan honoran membron de IFEF, s-anon Jaromír Babička. Nun 82-jara honorigito, ekde la gimnaziaj jaroj vigla esperantisto, estis en 1954 kondamnita pro sia Esperanto-laboro kiel "spiono" kaj trasuferis 4 jarojn en malliberejo. Kiam la kondiĉoj permesis tion, kun Bohumil Král li fondis la Ĉeĥoslovakian sektion de IFEF ĉe la Ministerio por trafiko en Prago. Li estas vera nestoro de ĉeĥoslovakaj esperantistoj-fervojistoj.

La aŭskultantojn refreŝigis vira kanthoro Dvořák per kantado de kantoj de ĉeĥaj klasikuloj. Ankaŭ la dimanĉa vespero estis dediĉita al arto kun arĉo-kvarteto (Jan Duda, Karel Doležal Miroslava Doležalová, Jiří Sova), kun operkantistoj Alina Farna, Miroslav Smyčka kaj Josef Vích akompanataj de pianistoj Lenka Životáková kaj Jiří Vychodil, kaj kun aktorino Eva Seemannová, kiu

deklamis la monologon de Marta el fama apokrifo de Karel Čapek.

Lunde la kongresanoj gvidataj de ĉiĉeronoj trarigardis la urbon, kuneidis la terminara kaj fake aplika komisionoj, posttagmeze okazis grandioza bankedo kaj vespere balo.

Marde kuneidis la komitato de IFEF akceptante decidojn kaj proponojn pri venontaj IFEF-kongresoj (1992 Munster en Germanio, 1993 Ravena en Italio, 1994 Aŭstrio, 1995 Hungario) kaj transdonante al la nederlanda reprezentanto inĝenoron kaj diplomon de "honora prezidanto de IFEF" por la vidvino de s-ro K.G.J. de JONG (1902-1979), iama prezidanto de IFEF (1958-1968), kiu nun estis postmorte distingita per honora prezidanteco. Petro Chrdle prezentis la ĉefan kongresan prelegon pri la projekto TER - Trans-Eŭropa Fervoja Koridoro Nordo-Sudo. Vespere la kongresanoj renkontiĝis kun lokaj esperantistoj, aŭskultis infanan kanthoron Přerovček kaj ĝuis pentraĵojn de Zdena Dvořáková diapozitive projekciatajn.

Merkredo estis dediĉita al tuttagaj ekekursoj. Du aŭtobusoj veturis norden al Rožnov kaj kvar aŭtobusoj suden al Velehrad kaj Strážnice. En Strážnice estis la reprezentantoj de la kongreso akceptitaj de la urbestro. En Rožnov kaj Strážnice oni trarigardis subielajn muzeojn de folkloro arkitekturo, en Velehrad bazilikon kaj muzeon de arkitekturaj skulptaĵoj. Strážnice plie proponis cimbalmuzikon kaj gustumadon en vinkelo.

Ĵaŭde kaj vendrede daŭrigis siajn kunsidojn la terminara kaj fake aplika komisionoj. Ĵaŭde posttagmeze realiĝis aŭtobusaj ekekursoj al la urboj Kroměříž kaj Bouzov, kaj vespere la folkloro ensemble Olešnice prezentis popolajn kantojn kaj dancojn.

La kongreso estis solene fermita vendrede je la 13.30 h antaŭ la kongresejo kun marĉo-muziko de fervojista blov-orkestro: la prezidanto de LKK Petro Chrdle transdonis la kongresan flagon al la prezidanto de la venonta LKK Joachim Giessner.

Dum la kongreso funkciis ankaŭ librovendejo kaj kongresa poŝto kun speciala kongresa poststampilo kun la teksto "43-a IFEF kongreso 11.-17.5.1991 Olomouc Ĉeĥoslovakio".

Por la sukcesa aranĝo de la kongreso necesas esprimi specialan dankon al la membroj de LKK kaj al lokaj esperantistoj, kiuj ofere helpis.

#### Glosoj:

- ČSD - ĉeĥoslovakaj ŝtataj fervojoj
- FISAIC - internacia fervojista organizo (neesperantista)
- IF - Internacia Fervojisto (gazeto de IFEF)
- IFEF - Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
- IKUF - Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
- KE - Kristana Esperantista Ligo Internacia (evangelia)
- LK - loka Kongresa Komitato

Miroslav Malovec

**Gilbert Schmit**  
**prezid. FISAIC**

Olomouc, la 12-an de majo 1991

### SALUTPAROLO AL ĈEESTANTOJ DE LA 43-a KONGRESO DE IFEF

Estas vere granda honoro por mi kaj eĉ pli granda ĝojo, ke mi rajtas saluti vin tie ĉi en Olomouc okaze de la 43-a IFEF-kongreso nome de FISAIC-prezidantaro. La floranta maja pejzaĝo moravia plaĉegis al mi dum la alvojaĝo, kaj la nomoj Wagram kaj Austerlitz (Slavkov) memorigis min je la epoko de la tiama historia renovigo de Eŭropo antaŭ ducent jaroj.

Ankaŭ tiu ĉi kongreso okazas sub signo de renovigo, tiel ke mi esperas, ke ĝi fariĝos pruvo pri tio, ke tiaj ŝanĝoj ankaŭ povas okazi pace.

Mi esprimas min tiel, ĉar tiu ĉi urbo ŝajnas al mi aparte taŭga por liveri tiun pruvon. Precipe mi dankas al niaj ĉeĥoslovakaj ĝeamikoj pro ilia bona decido elekti tiun ĉi urbon kiel kongreslokon. Jam pro tio meritas grandan laŭdon sinjoro doktoro Petro Chrdle.

Tie ĉi en unu el la gravaj nodoj de Eŭropo, precipe de l'Eŭropo de la reloj - kiel pravas la densa reto de ĈSD, mi fakte povas kontribui fari nian mondon pli humana kaj vivinda. Helpe de la nun mondvaŝte riceveblaj amaskomunikiloj tia universala lingvo kiel Esperanto povus havi ege bonan efikon.

Vi fervojistaj esperantistoj ĉi-rilate en multaj pasintaj jaroj faris pioniran laboron, kaj oni esperu, ke la konstanta semado en la venontaj jaroj kondukos al bonaj rezultoj. Tiam tiu via kontribuo pri alproksimiĝo de la fervojistaj kolegoj en ĉiuj landoj povos helpi atingi tion, kion la granda sciencisto Sacharov intencis atingi, nome konservi la homan en la homo kaj la naturan en la naturo. Vere valoro celo! Kaj kiamaniere ĝi pli bone povus esti atingita ol per interkompreniĝo de unuj kun aliaj. Nur sur tiu bazo estos eble krei progresojn por la mondo.

Por kompreni la alian oni devas uzi saman lingvon. Tiam jam multaj danĝeroj estas forigitaj. Kaj multo komuna povas esti

travivata komune kun amikoj. Ni ne forgesu: Dividita ĝojo estas duobla ĝojo, dividita sufero estas duona sufero.

Restas nun al mi deziri al via kongreso plenan sukceson, kaj ĝi fariĝu nova meĥoŝtono por daŭra kaj bona evoluo de Esperanto inter fervojistoj en la tuta Eŭropo. Havu tie ĉi en Olomouc kaj en la tuta programo belajn tagojn kaj kunportu belajn memoraĵojn kune kun la konvinko, ke vi laboras por ideo kaj idealo, por kiu valoras agadi.



## Unika horarŝanĝo, nova vojaĝ-kvalito

Kiel konate, ĉiujare ĉe ĉiuj fervojoj okazas la antaŭsomera horarŝanĝo, kiu kutime, kvankam ne ĉiam kaj ĉie, estas akompanata de pli-malpli da novaĵoj en la komplika sistemo de la internacia kaj naciaj trajnetoj. Sed tiu horarŝanĝo, kiu okazas ĉi-jare en Germanio, estas vera unikaĵo.

Kaŭzas tion ĉefe tri faktoroj, nome:

- la unuan fojon en tiu ĉi jarcento oni ekfunkciigas en Germanio du novajn fervojajn liniojn por longdistanca trafiko. Temas pri la linio de Hannover al Würzburg kun 327 km kaj de Mannheim al Stuttgart kun 100 km da longeco. Ili fariĝas partoj de la jam modernigita reto de ĉeflinioj, sur kiuj trafikas la konataj InterCiti-trajnoj kaj nun ekde la horarŝanĝo ankaŭ la nova kategorio de InterCitiEkspress-trajnoj(ICE).

- la dua faktoro estas, ke la Germana Federacia Fervojo(DB) nun ekfunkciigas 41 el tiuj novaj ICE-trajnujoj - kaj 19 pluraj sekvos - kiuj aparte estas konstruitaj por tiu nun komenciĝanta grandrapida trafiko. La novaj linioj permesas tra grandaj distancoj veturi 250 km po horo. Tio antaŭkondiĉis priatenti tute novajn principojn sub ofte severaj geografiaj kaj geologiaj kondiĉoj en la konstruado de la trakoj, pontoj kaj tuneloj, sed ankaŭ de la veturiloj mem. Precipe en la tuneloj ekestas terure altaj aerpremoj, kiam renkontiĝas du trajnoj en ili. Tial oni ankaŭ devis konstrui la vagonojn tiel, ke pordoj, fenestroj kaj la vagonoj entute povas elteni tiajn premojn. Por ion mildigi la premojn, oni faris ĉiujn novajn tunelojn pli larĝaj ol ĝis nun estis kutimo.

- La tria faktoro en tiu unika horarŝanĝo estas la evoluo de novaj trafikstrukturoj kaŭzitaĵaj pro la unuiĝo de Germanio. Ĝis nun la ĉefaj trafikrentoj iris de nordo al sudo kaj inverse. Sed nun aldoniĝas la bezono por multaj vojaĝoj inter okcidento kaj oriento. Necesis komence de 1990 tre rapide - kvankam tiam relative provizore - starigi novajn veturplanojn, por almenaŭ parte adaptiĝi al tiu nova situacio. kiu sur la ŝoseoj kelkloke jam kaŭzis kolapsojn. Tamen nun la du ankoraŭ ekzistantaj fervojoj DB kaj DR interkonsentis pri tute nova definitiva horarkoncepto.

Kiajn gravajn ŝanĝojn tio kaŭzas, oni povas ekoni el jenaj ekzemploj: Ekzistas nun du linioj inter la okcidenta kaj sudokcidenta partoj de Germanio unuflanke kaj Berlin aliflanke, sur kiuj trafikas IC-trajnoj en duhora takto. Aldoniĝas unuopaj IC inter Hamburg kaj Berlin kaj kelkaj IC, kiuj ĝis nun trafikis inter Paris kaj Frankfurt ĉe Main, kiuj estas plilongigitaj al Leipzig kaj Dresden, do al tereno de eks-GDR. Krome ekestis novaj rektaj komfortaj interligoj inter Berlin kaj Amsterdam. La signifon de tiuj ŝanĝoj oni povas prijuĝi aŭdante, ke nun pli ol 600 longdistancaj rapidaj trajnoj potaĝe trafikas laŭ takthoraro. Tio donas bonegajn ofertojn al la pasaĝeroj, ĉar ekestas multe da novaj laŭplanaj trajnkonektoj en pli ol deko da plej gravaj germanaj fervojaj nodoj.

Tiu rigora takthoraro kun sia vasta interplektado tamen pli multe ol la ĝisnuna, pli fleksebla sistemo, estos atakebla pro transigo de malfruigoj de trajno al trajno. Finfine ja ne nur temas pri la grandrapidaj trajnoj, sed same pri proksimume dudekmil aliaj, kiuj trafikas en kaj ĉirkaŭ la ekonomiaj centroj, sed ankaŭ inter pli malgravaj lokoj. Tial estis unu el la gravaj taskoj en la ellaborado de tiu nova horaro, ke oni kreis taŭgajn interplektojn inter la rapidaj longdistancaj kaj ĉiuj aliaj trajnoj. Ankaŭ por ili oni multloke enkondukis takthorarojn.

Ĉi-loke mi menciou, ke sur la reto de DB necesas enkonstrui en tiun jam sufiĉe komplikan sistemon milojn da vartrajnoj, kiuj ja ne malhelpu la trafikon de la pasaĝertrajnoj.

La ĝis nun aŭditaj sciigoj estus nekompletaj, se oni ne donus informojn pri la nova komunikad-sistemo en la ICE-traĵnoj. Ili nome prezentas novan modernan, perkomputilan sistemon kaj por la pasaĝeroj kaj por la trajnpersonaro. Tio komenciĝas jam en la vagonaj enirejoj, kie elektronike direktitaj tabuloj indikas la numerojn de la trajno kaj vagono kaj la itinerson de la trajno kun haltejoj en digita maniero.

Ĉe ĉiu sidloko ekzistas ebleco, ke oni tra kapaŭdilo povas elekti inter 6 programoj, nome tri donitaj el la trajno mem kaj tri de ĵus addeblaj ultrakurtdaj sendiloj el la regiono, kie la trajno troviĝas. En po unu grandsalona vagono de la unua kaj dua klasoj ekzistas ebleco, spekti videoprogramojn helpe de bildkranoj, kiuj troviĝas en la dorsapogiloj de la antaŭaj seĝoj.

Krome en ĉiu vagono estas instalita speco de informcentro, kie la pasaĝeroj povas havigi al si respondojn pri demandoj, kiuj rilatas al la vojaĝo. Aliaj informoj, kiel ekz. pri la venonta haltstacio aŭ malfruiĝoj, kiuj ĝis nun estis faritaj per mikrofono, nun helpe de komputilo digite estas donataj. La komputilo cetere estas tiamaniere programita, ke ĝi donas la informojn depende de la linio-kilometro, kie la trajno ĵus troviĝas.

Provizore en la unua klaso, iam poste ankaŭ en la dua, helpe de klavo la pasaĝeroj povas voki anon de la trajnpersonaro, kiuj portas kun si etajn ricevilojn, tiel ke ili tuj povas konstati, de kie oni vokas.

Ĉiu ICE havas 3 telefonojn, el kiuj po unu en vagonoj de unua kaj dua klasoj kaj unu en la konferenc-kupeco. Eĉ eblas altelefoni pasaĝerojn en tiaj trajnoj el de iu ajn loko.

Fine ni aldonu almenaŭ koncizan informon pri la specialaj sekurigaj instalaĵoj, kiuj entute ebligas veturi per tia granda rapideco. Por tiuj 327 km inter Hannover kaj Wurzburg oni konstruis 8 sur-lokajn centrajn reĝejojn. Ili sufiĉas, por komplete observi, gvidi kaj sekurigi ĉiujn trajnojn troviĝantajn en la linio. En la interspacoj inter tiuj reĝejoj ekzistas proksimume en ĉiu sepa kilometro la ebleco, ŝanĝi de unu trako al la alia.

Ankaŭ por la lokomotivostroj multo ŝanĝiĝis. Inter la reloĵ de la trako troviĝas speco de anteno, la tielnomata kontinue aŭtomata trajngvidado, kiu seninterrompe komunikas ĉiuspecajn informojn al la lokomotiv-kondukejo. Inverse la trajno transdonas ĉiujn datojn al la centralo, kie oni povas kompari ilin kun la firme programitaj datoj. Tiu sistemo funkcias ĝis nun je distanco de 5 km antaŭ la trajno, sed nun ĝis 10 km. Tiel la gvidanto en la centralo ĉiunomente havas ekzaktan superrigardon pri la stato sur la linio. Fakte per tiu sistemo la trajnoj aŭtomate estas kondukataj. La lokomotivostroj principe nur ankoraŭ havas la funkcion de observanto.

Kompreneble oni ankaŭ devas kalkuli pri perturboj. Por garantii, ke ankaŭ ĉi-kaze la trafiko funkcias, la trajnoj tiam povas veturi helpe de la normlaj ĉef-kaj antaŭsignaliloj, kvankam nur ĝis maksimume 160 km/h.

Por protekti laboristojn, kiuj ie en la linio laboras, oni uzas specialajn avert-instalaĵojn. Helpe de ili la avert-gardisto konfirmas per premo de speciala klavo, ke la laboristoj forlasis la trakon. Nur poste la signaliloj por la alproksimiĝanta trajno povas esti metataj en la pozicion "libera".

Oni substreku, ke ĉio, pri kio ni ĵus aŭdis, estas antaŭstupo kaj antaŭkondiĉo por io, kio jam sekvas: nome la eŭropa reto por grandrapidaj trajnoj. Por ĉin realigi, ankoraŭ necesas konstrui aŭ modernigi en multaj landoj liniojn, kiuj permesos veturi per tiaj grandaj rapidecoj. Sed jam nun oni povas konstati, ke fare de favora internacia komuna laboro de la fervojaj specialistoj ekestis kaj pli kaj pli ekestas eŭropa reto de rapidaj kaj grand-rapidaj trajnoj, favora por la fervojaj pasaĝeroj kaj por la internacia ekonomio, sed same necesa por la fervojoj mem, por povi konkurenci kontraŭ la individuaj aŭtografiko, kontraŭ la surŝoseaj kamionoj kaj kontraŭ la aviadiloj.

J. Kavka

Jam antaŭe (STARTO 1990, 2, 15) mi aludis, ke Esperanto estas same malfacila kiel etnolingvo, se konsideriĝas vortsignifoj. Tiun ĉi ne tre bonvenan, kvankam realisman, sperton mi demonstru nun helpe de la du titolo prezentitaj terminoj.

**Fenomeno** en la senco fizika, kemia, astronomia k.t.p. estas bone difinita en PIV kaj ilustrita per ekzemploj: lumelektra, sparka k.a. fenomenoj. Plurajn oni estas nominta laŭ ties malkovrintoj, ekz. doplera (laŭ Doppler), konata en akustiko, optiko, astronomio k.a. En ekologio, aktuala temo estas la fenomeno forĉeja (malpli traŭe "orangeria"), kiun iuj meteorologoj emfazas pro la karbondioksido-amasiga atmosfera, dum aliaj (ekz. Kenneth E.F.Watt) la koncernan dangeron por nia planedo bruske kontestas (SCIENCA MONDO, 1988, 4, 18-20).

Sed mian atenton ĉi-okaze kaptas ne meteorologia, sed la pure terminologia - aŭ pli precize dirite: semantika aspekto:

Antaŭ multaj jaroj (SCIENCA REVUO, 1949, 3, 109) W. P. Roelofs, la tiama SR-redaktoro, prave riproĉis al F. J. Belinfante, inilita de l'anglelingva "effect", ke li estis aplikinta la terminon "efekto" anstataŭ la gusta "fenomeno".

**Efekto**, laŭ PIV, estas: Forta impresio larita sur la koron aŭ la spiriton, precipe de belarta verko, spektaklo k.m. El la kvar zamenhofaj ekzemploj registritaj en PIV mi citas jenan unu: aspiri sensacian efekton. Eksplicite rimarkigas PIV: Evitinda estas la uzo de efekto en la signifo "fenomeno".

Mi revenu ankoraŭ al la prava argumentado de Roelofs: Sinjoro Belinfante defendas la uzon de la vorto "efekto" per la aserto, ke la malkovro de tia "efekto" kaŭzis grandan efekton ĉe la tiamaĵ fizikistoj. Tio ja estas ebla, sed restas, ke la fenomeno kaj la efekto, kiun ĝi kaŭzis ĉe la fizikistoj, estas du tute diversaj aferoj, kaj ke tial oni ne povas tiel pravigi la uzon de tiu vorto. - Ĝis tie ĉi Roelofs.

Memkomprene, etnolingvoj daŭre influas semantikon de esperantlingvaj terminoj. Sed okaze de la lingvo angla, oni estu aparte singarda, ĉar ĝia unuopa termino kutimas porti eksterordinare rican svarmon da sencoj. Tia senco-spektro nepre ne rajtas transportigi en Esperanton. Bedaŭre, multaj esperantistoj ne tre cerbumas pri koncernaj semantikaj problemoj, ŝkiave obeante kutimojn de sia lingvo gepatra.

Jen kial en la nuntempa Esperanto dense aperadas pekaj kontraŭ vortsignifoj konsistigantaj la zamenhofan lingvofundamenton. Oni neniam forgesu, ke tiuj ĉi vortsignifoj estas bazitaj sur gisfunda serioza analizo de multaj etnolingvaj fontoj.

Konsekvence, mi neniam povas jeŝi el Wang Xudong kaj Wang Zhaolin, se ili skribas pri forĉeja "efekto" (TUTMONDAJ SCIENCŬJ KAJ TEKNIKOJ, 1990, 3/4, 43). Al la ĉina revuo mi referencas sole pro la freŝdata uzo, ne malseparante lokon por referenci al ceteraj renomaj Esperanto-periodaĵoj (ekz. al la oficiala organo de UEA k.m.a.).

Konklude kaj konekse, mi rememoras pri traŭa eldiro de nia brilega ĉeĥa esperantisto, la karmemora d-ro Tomáš Pumpr: "Jes, vere, Esperanto estas tre facila lingvo - sed sole por la komencantoj!"

(17.3.1991)



## Nutraĵoj sen venenoj

Hodiaŭ ni tre ofte parolas pri kvalito de la nutraĵoj. Oni diras, ke nutraĵoj estas venenaj. En la naturaĵ-enhavo estas ne nur amiloj, glicidoj, proteinoj, vitaminoj, sed ankaŭ diversaj mineraloj kaj organikaj materialoj. El aero kaj el grundo eluzas plantoj ankaŭ venenajn materiojn, kiel ekzemple metalojn: arsenon, plumbon, hidrargon, kadmion ktp. Ankaŭ diversaj organikaj kombinoj estas en niaj nutraĵoj. Malfavore ni parolas pri polikromaj bifeniloj, pri diksidoj, pri klorigitaj karbonhidratoj ktp. Niaj metodoj por kulturado de la plantoj uzas multe da kemiaĵoj. Ni parolas pri fertiloj (industriaĵ strekaĵoj). Ekzemple en superfosfato estas ankaŭ arseno kaj kadmio, en azotaj strekaĵoj estas nitratoj ktp. Hodiaŭ ni jam bone konas, ke plantoj kaj ankaŭ homoj kaj bestoj ne povas vivi sen mineralaj elementoj, kiujn ni nomas biogenaj makroelementoj kaj biogenaj mikroelementoj. Tio signifas, ke niaj korpoj estas el oksigeno, hidrogeno kaj karbono - tiujn ĉi tri makroelementojn ricevas nia korpo, sed ankaŭ la korpoj de bestoj kaj plantoj, el akvo kaj el aero. Sed sole verdaj plantoj eluzas karbonon el la aera karbonoksido. El grunda akva solvaĵo havas plantoj fosforon, kalion, azoton, sulfuron, magnezion kaj feron. Ankaŭ mikroelementoj devenas el grundaj solvaĵoj, tio estas precipe boro, mangano, kupro, zinko, kobalto kaj ankaŭ jodo. Por sana vivo estas grava ankaŭ natrio, silicio, kloro kaj aluminio. Bezonataj estas ankaŭ malgrandaj kvantoj de aliaj mikroelementoj, fluoro, kromo kaj aliaj. Ekzemple ni nuntempe bone scias, ke kromo estas tre venena por la korpo, sed sen ĝi malbone funkcias la pankreaso. Se oni aldonas tre malmulte da kromo en bona kemia kombinaĵo, la pankreaso funkcias bone. Tio estas la novaĵo el Usono. Simile ne povas funkcii la vitamino B<sub>12</sub> sen kobalto kaj la sango sen fero. Sen magnezio ne estiĝas klorofilo, sen sulfuro, azoto kaj fosforo ne ekzistus proteinoj ktp. Profesoro Nesmeĵanov el Moskvo antaŭ 25 jaroj diris: "Homoj kiuj ne uzas sciojn de la kemio faras erarojn, sed tiuj, kiuj malbonuzas la kemion, faras eraron miloblan."

Tre venenaj povas esti pesticidoj, kemiaĵoj por la agrikulturo. Precipe herbicidoj, insekticidoj kaj fungicidoj. Tre venenaj estas hidrargaj impregnoj por tritiko kaj por aliaj grenoj. Karbonoksido kaj oksido de la sulfuro ne estas venenaj por kreskaĵoj, ĉar en la grundo ili sangiĝas je tre bonaj strekaĵoj. Sed tre danĝera povas esti en la grundo kaj en akvo kaj pluvo la radioaktiveco, radioaktivaj jodo, stroncio kaj cezio.

Ĉu ni povas forigi tiujn venenajn materialojn el la grundo kaj akvo aŭ el kreskaĵoj, viando kaj lakto?

Por miloj da hektaroj ni ne posedas efikan metodon, sed por malgrandaj areoj - por ĝardenoj - sufiĉe bonaj metodoj ekzistas. Printempe ni aldonas al la grundo iom da kalcio-oksido kaj forigas tavolojn de 5 ĝis 8 mm de argilo, ĉar dum 5 vintraj monatoj falis 75 % de la tutjara ekologiaj malpuraĵoj. Poste ni povas semi semojn kaj ekplanti kreskaĵojn. En niaj nutraĵoj restos nur kvarono de la venenaj materialoj. Aliajn agrikulturaĵajn materiojn oni devas meti en la grundon kiel medikamentojn kaj nur en kelkaj tre gravaj kazoj.

Plantoj eluzas nitrogenon, kiu estas por homoj kaj bestoj ne nur venena, sed ankaŭ kancerogena. Se ni elfosas legomon kun la radikoj, ekz. laktukon, kaj lasas ĝin unu tagon sub lumo en pura trinkakvo, la fotosintezo transformos la nitrogenon en proteinojn kaj la legomo poste ne estas venena.

De tie devenas novaj metodoj kiel akiri legomojn sen radioaktiveco, sen pezaj metaloj, sen polikromaj bifeniloj kaj sen nitrogenoj.

RNDr. Ing. Jaromir Šikula, CSC

## Vortareto:

aluminio - aluminium, hliník (lat. alumen = kamenec),  
arseno - arzén (percky: zarnika = zlatý; arzén se podobá zlatu),  
azoto - starý název dusíku (viz nitrogeno),  
boro - bór (persky: burax = borax, tinkal),  
bromo - brom (řecky: bromos = zápach),  
cezio - cesium (lat.: caesius = modrošedý),  
fero - železo (lat. ferrum = železo),  
fluoro - fluor (lat.: fluere = téci),  
fosforo - fosfor (řecky: fós = světlo; foreo = nosím),  
halogeno - halogen (řecky: hals = sál),  
hidrargo - rtuť,  
hidrogeno - vodík (řecky: hydor = voda),  
jodo - jód (řecky: ioedies = fialový),  
kadmio - kadmium (z řěčtiny - Kadma = mytologický král),  
kalcio - kalcium, vápník (lat. calcium = vápník),  
\* kalcioksido - hašené vápno (kalko),  
kalio - draslík (arabsky: qali = potaš),  
karbono - uhlík (lat. carbo = uhlí),  
kloro / ĥloro - chlór (řecky: chloros = zelenožlutý),  
\* klorigita / ĥlorigita - chlorovaný,  
\* klorofilo / ĥlorofilo - chlorofyl, zelení listová (řecky: fyllon = list),  
kobalto - kobalt (něm. Kobalt = důlní skřítek vyměňující stříbro za kobalt),  
kromo / ĥromo - chróm (řecky: chróma = barva),  
\* polikroma / polihroma - polychromní, mnohobarvený,  
kupro - měď, (řecky: kyprion = kyprský kov),  
magnezio - magnezium, hořčík (Magnésie - maloasijské město),  
mangano - mangan (zkomolenina z Magnésie),  
natrio - natrium, sodík (zkomolenina z lat. nitrum = soda),  
nitrogeno - nitrogen, dusík (lat.: nitrum = soda),  
oksigeno - oxygen, kyslík (řec.: oxy = ostrý, kyselý, vtipný; gennao = tvořím),  
plumbo - olovo (lat. plumbum = olovo),  
silicio - křemík (lat.: silix = křemen),  
stroncio - stroncium (podle skotského města Strongsag),  
sulfuro - síra (lat.: sulfur = síra),  
zinko - zinek (něm.: Zink),

**amilo** - amyl, organická skupina obsahující pět atomů uhlíku  
 (řecky a = ne; mylon = mlýn; amyl = nemletý),  
**bifenilo** - bifenyl, cyklický aromatický uhlovodík se dvěma  
 nekondenzovanými jádry (lat.: bis = dvakrát, ještě  
 jednou; řec.: fainó = svítím),  
**biogena** - biogenní, nutný k životu (řecky: bios = život),  
**elemento** - prvek, živel (lat.: elementum = základ),  
 \* **makroelemento** - makroelement, prvek potřebný k životu,  
 \* **mikroelemento** - mikroelement, stopový prvek, prvek nutný k  
 životu ve velmi malém množství,  
**fertilo** - umělé hnojivo (lat.: fertilis = plodný, úrodný,  
 výnosný),  
**fosfato** - fosfát, fosforečnan, užíván jako hnojivo,  
 \* **superfosfato** - superfosfát, hnojivo z přirozeného fosfátu  
 vyrobené kyselinou sírovou,  
**fotosinteza** - fotosyntéza, rozklad kysličníku uhličitého v  
 rostlinách světlem (řecky: fós = světlo; syn =  
 = spolu, dohromady; ti-thé-mi = kladu),  
**fungicido** - fungicid, látka houbovorná,  
**glicido** - glycid, sacharid, cukr (řecky glykos = sladký),  
**herbicido** - herbicid, přípravek proti plevelu,  
**insekticido** - insekticid, přípravek proti hmyzu,  
**karbonhidrato** - karbonhydrát, glycid, cukr,  
**kancero** - rakovina (lat.: cancer, carcin = druhy koryšů),  
**kancerogena** - karcinogenní, rakovinotvorný,  
**karbonoksido** - kysličník uhelnatý,  
**kemia / hemia** - chemie (arabsky: al-kimia),  
**kombinaĵo** - sloučenina (lat.: com = s; bíni = dva),  
**laktuko** - hlávkový salát,  
**oksido** - oxyd, kysličník,  
 \* **dioksido** - dioxyd, sloučenina jednoho atomu prvku s dvěma atomy  
 kyslíku (řecky: dyó = dva),  
**pankreato** - slinivka břišní (řecky: pan = vše, kreas = maso),  
**pesticido** - pesticid, látka hubící živé organismy (lat.: pestis =  
 = netvor, příšera, mor, nákaza; caedere = zabíjet),  
**proteino** - protein, bílkovina (řecky prótos = první),  
**solvaĵo** - roztok (solvi = rozpustit),  
**sterko** - hnůj,  
**sulfato** - sulfát, síran,  
**veneno** - jed,  
**veneni** - otrávit

## Marie Bartovská: Denove al problemoj de propraj nomoj

Mi tralegis en Starto la artikolon "Problemoj de propraj nomoj" (J. Chvošta, Starto 1990, 5, 22). Por mi ne temas tre pri la nomoj, kiel pri aliaj ĝiaj partoj.

Nu, la nomojn mi nepre ne esperantigus. Laŭleĝe oni ja ne darfas nomojn ŝanĝi sen speciala permeso. Tial mi subskribas "Marie" aŭ eventuale "Maria" (laŭ Biblio). Vero estas, ke Mario estas en Italio li. Koncerne la ofendon de virinoj ĉiuj ĉehinoj devus sin senti ofenditaj, ĉar la finaĵo -ová estas adjektiva, ja ĝia originalo -ova eĉ poseda. Tamen "kutimo estas fiera ĉemizo" kaj mi sentus min malfeliĉe, se mi devus skribi "Maria Bartovský". Mi ja rajtas havi propran nomon.

La geografiaj nomoj estas ankaŭ granda problemo. Esperanton bedaŭrinde ne regas ankoraŭ ĉiuj homoj. Skribante leteron mi ne povas skribi "Vieno, Aŭstrio", sed "Wien" por la aŭstra poŝtisto kaj "Rakousko" por la ĉeĥa poŝtisto. Kial oni tiom da peno kaj papero ofertas al serĉado de nomoj "plej internaciaj", kaj argumentas per la 15-a fundamenta regulo? Ĉi regulo ja estas la antaŭlasta en la Zamenhofa gramatiko, por okazoj, kiam la antaŭaj ne donas eblecon. Ke krom la finaĵo -uj- Zamenhof en landonomoj uzis aliajn formojn, tio estis nur eksperimentoj de la tre modesta viro. Kaj li rajtis kaj devis eksperimenti. Tamen, se li Esperanton kreus nur laŭ la 15-a regulo kaj por ĉiu vorto serĉus la plej internacian formon, Esperanto tute ne ekzistus.

Ni ne havus la la vorton "patrino" - en multaj lingvoj la nomoj de la "patroedzino" komenciĝas per "m", frato per "s". Tial en Esperanto la landnomoj finiĝu per -io. En ĉeĥujo (= skatolo por ĉeĥoj) mi ne ŝatus vivi. Same kiel ĉe la finaĵo -ino oni tuj scias, ke temas pri virino, oni sciu, ke Brazilio estas lando kaj Brazil-urbo ĝia ĉefurbo.\* Ĉu nur angloj rajtas aldoni "Citty" en multaj kazoj? La almetata "lando" estas por parolado same longa (duesilaba), sed por skribado je tri literoj pli longa.

Post transitivaj verboj oni nepre uzu akuzativon. Se al iu ne plaĉas "mi vizitis Poděbrady-n", tiu diru "la urbon Poděbrady". Nepre oni ne uzu iajn prepoziciojn, kiuj havas jam sian propran signifon. Ne taŭgas ankaŭ la neŭtrala ie, ĉar ĝian signifon devas kompletigi la kunteksto kaj la nomo de urbo tion ne kapablas fari. "Mi vojaĝas por Berlin" signifas, ke oni donis al mi ian taskon, kiu servas al Berlin. Per al oni haltas antaŭ la urbo, ĉar para prepozicio estas ĉe. Ĝis ne estas prepozicio, sed adverbo, montranta ekstremon. Se oni diras "mi veturas ĝis Berlin", do oni ne scias, ĉu oni veturas ĝis al Berlin, aŭ ĝis en Berlinon aŭ ĝis malantaŭ Berlinon. En iuj okazoj oni povas la prepozicion ellasi, sed nur, se temas pri al. Kiel pluraj aliaj vortoj ankaŭ ĝis servas kiel subjunkcio, (kiu k.s.). Trane Berlin oni eventuale povas fiugi.

Germana lingvo vere havas nur "in" kiel Esperanto "en", sed same en du gramatikaj kazoj: in der Stadt = en la urbo" kaj "in die Stadt = en la urbon". Al Kolín = ke Kolínu, por Kolín = pro Kolín. Ĝusta estas nur "en Kolín-on". La aliaj prepozicioj sur ktp. estas gravaj, ĉar ĉiu el ili esprimas precize sian signifon, sed ankaŭ ili estas "porlokaj", do ankaŭ ili uzas ambaŭ kazojn por ĝuste respondi je la demando "kie" aŭ "kien".

Se aliaj lingvoj ne havas iujn regulojn, kiujn havas Esperanto aŭ germana aŭ ĉeĥa, ili devas la situaciojn esprimi per aliaj reguloj, kutime tre komplikaj kaj precipe ne regulaj. Kaj pro tio devis ekesti Esperanto, lingvo simpla, logika kaj regula. Oni devas esti ankaŭ tolerema, sed ne tiom, kiom la diranto "Muŝoj, formanĝu min!". Oni ne faru el ĝi novan Babilonon!

---

\* Rimarkigo de redaktoro:

Ekzistas Alĝero, Mekseko (urboj) kaj Alĝerio kaj Meksikio (landoj), sed ĉe Brazilo ekzistas escepto eliranta el la origina lingvo: Brazilo (lando) - *Brasil*; Brazilio (urbo) - *Brasilia* !

### ... kaj estis decide

En tempoj longe pasintaj, kiam sur fervoja linio veturis trajno du-tri fojojn tage, loĝantoj de iu bohemia urbo plendis ĉe la koncerna instanco, ke la traveturantaj trajnoj timigas ilian paŝtantan sin brutaron. La petskribo estis pritraktata fine en kabineto kaj tiu ĉi proponis, ke laŭlonge de la fervoja linio oni konstruu tiom altan kaj densan barilon, ke la trajno estu nek videbla nek aŭdebla.

Al tiu ĉi propono la koncerna fervoja direkcio respondis per oficiala proklamo, kiu finiĝas per jena frazo: "Cetere ni havas tiun senduban opinion, ke bovoj kaj azenoj devas al kutimiĝi al la fervojo, ne la fervojo al la bovoj kaj azenoj."

### Signaloj per sonorilo

Tiaj akustikaj sciigoj estas unu el la plej malnovaj fervojaj signaloj. Oni uzis ĝin jam sur la Norda Fervojo de la Imperiestro Ferdinando en Aŭstria Imperio. En la fervoja stacio, kie komenciĝis trajnveturo, oni anoncis per la unua sonorado 15 minutojn antaŭ forveturo de la trajno, ke la vojaĝantoj alvenu al la vagono de la koncerna klaso kaj envagoniĝu. Post tiu ĉi signalo la konduktoroj devis helpi al la pasaĝeroj dum envagoniĝo. Post 10 minutoj, de 5 minutojn antaŭ la forveturo, la sonorilo eksonis la duan fojon. La konduktoroj komencis fermi vagonojn, forigis ŝtupetojn kaj alvokis pasaĝerojn montri vojaĝbiletojn. La lokomotivestro alveturis kun lokomotivo kaj kuplis ĝin kun la vagonaro. Tria sonorado estis signalo por ekveturo.

En interstacioj anoncis la unua signalo de la stacia sonorilo alvenon de la trajno, la dua preparon por forveturo kaj la tria ekveturon. Signaloj per la sonoriloj estis uzataj antaŭ 145 jaroj.

J. Tomášek

Kredu, aŭ ne kredu, sed mi spertis iam, ke eĉ tute kvieti kaj pacema kulturlaboranto povas dum sia laboro travivi aventuron, dum kiu hirtigas la haroj sur lia kapo. Hodiaŭ ŝajnas al mi tiu okazaĵo kun la t r o g o kiel humura, sed tiam?

Ne temis pri iu fantomo. La fantomoj vivas en malnovaj kasteloj, sed ne en malgranda gasteja ĉambrego. Do, vi jam iom konas la scenejon kaj ankaŭ, al la junaj homoj ne tro konatan objekton, la trogon. Do, antaŭen!

Mi mem estis efektive entirita en amatoran aktivecon tuj la unuan vesperon post mia alveno en - por mi ĝis nun nekonatan - sudmoravian vilaĝon. Estas vero, ke mi tiam ankoraŭ eĉ bone ne sciis, kie mi tranoktos, sed mi jam partoprenis teatran provon de la lokaj amatoroj. Al ili nome mankis por ĝuste tiam studata komedio la dua "amanto" kaj venis kiel "deux ex machina" nova juna instruistino.

Mi ne plu memoras, sed mi verŝajne noktis bone, sed por sekventaj dekkvar jaroj mi estis tute perdita en polvo de la estradoj. Mi gajnis ia neniam laŭrojn, pli ofte insultojn, sed tio ne gravas plu.

En mia nova agadejo funkciis tiam du amatoraj grupoj. Unu ludis ĉe gimnastika organizaĵo Sokol. Laŭ ĝia kunveno, staranta sur deklivo, oni nomis tieajn konfesantojn "supra ekstremo". La dua estis organizita ĉe futbalklubo, kies ludejo sin etendis sube sur ebenaĵo, tiel nomata "suba ekstremo". Inter ili ekestadis de tempo al tempo certaj sendangeraj kvereloj, sed tio ne povis deteni min de ambaŭflanka aktiveco.

En ambaŭ grupoj mankis nome reĝisoroj kaj mi al ili ŝajnis esti taŭga persono por tiu ĉi agado. La teatro logis min, la tasko de peranto inter du rivalaj grupoj imponis al mi. Mi havis sufiĉe da tempo kaj bonajn amikojn tie ĉi kiel tie. Do, mi akceptis.

Foje invitis min la "subaj" surscenigi ian seriozan dramon el kampara medio. La aŭtoron kaj la titolon mi ne plu memoras, sed mi neniam forgesos la premieron.

Oni ludis en ne tro granda gasteja ĉambrego, kie la spektantoj en la unua vico rekte rigardis ŝuojn de la aktoroj. Aŭtoro de la teatraĵo preskribis al la protagonistino en la dua akto lavadon de tolaĵo sur la scenejo. Ŝajne neniu reĝisora problemo. La aktorino estis laborema knabino, sperta pri mastrumaj laboroj. Dum la provoj ni do nur imitis la lavadon sen iloj. Fine por la premiero ni prunteprenis de la gastejestrino la trogon kaj por pligrandigi realecon, ni enverŝis en ĝi iom da akvo.

Venis la paŭzo antaŭ la dua akto. La spektejo estis plenplena, la spaco ĉirkaŭ la scenejo tro malgranda, la aero respirebla kaj tial mi rapidis daurigi la dramon kiel eble plej baldaŭ. Sed tio etis principa eraro.

Nia duonsufokita sufloro metis sian scenaron sur la plankon antaŭ la budo kaj por rektigi lacajn kruojn li elgrimpis pene el ĝi, por iom helpi malantaŭ la kurteno. Tie li prenis kun iu aktoro la trogon kaj trenis ĝin sur la scenejon.

En tiu momento komencigis nia vera tragedio. Reirante li surpaŝis sian kasantan scenaron antaŭ la budo kaj glitfalis. La sekvo estis terura. Lia helpanto nature ne sukcesis teni la trogon, ankaŭ li lasis fali ŝin kaj la akvo elverŝiĝis sub la kurteno sur la unuan vicon de la publiko, kie sidis la estraro de la komunumo kun la sinjoro vilaĝestro.

La sola kompleta scenario, kiun ni havis, estis distretita kaj ĝiaj folioj naĝis sur marĉeto de la elverŝita akvo. Sed nia malbonŝanco, bedaŭrinde ankoraŭ ne finiĝis. Ni ne nur ne kapablis rapide kurmeti kaj ordigi la foliaron de la kripligita libreto, sed ni perdis eĉ la sufloron. Li, falinte sub pezo de la trogo, vundis sian piedon. Kun peno ni levis lin kaj kuŝigis lin en nia "garderobo", t.e. en gasteja provizejo.

En la spektadon ni ne kuraĝis rigardi eĉ per la fendeto. Al ni sufiĉis tio, kion ni audis de ĉi tie tra la kurteno. Maignaŭ ĉio ĉi ni estis devigataj dadrigi.

La dramon ni finludis sen sufloro. El malsekaj, malpurigitaj kaj kungluitaj foliaĵoj ne eblis legi. Bonŝance la aktoroj sciis siajn rolojn perfekte parkere. Sed kvietaj ili tamen ne estis. Kiam leviĝis la kurteno, ni nome ekaciis, ke la unua vico de seĝoj estas preskaŭ sen spektantoj.

"Ĝi estas skandalo", ni lamentis mallaŭte.

Sed antaŭ ol finiĝis la dua akto, retenis tristajn vizaĝojn nur tiuj, al kiuj tion preskribis la aŭtoro, rilate al seriozeco de la teatraĵo. Jen, kelkfoje malfermiĝis la pordo en malantaŭa muro kaj el la lumo en mallumon de la rigardejo silente enplitis unu post la alia iuj komunumaj konsiliantoj.

La tria akto pasis jam kun ĉeesto kaj atento de la publiko, inkluzive la sinjoron vilaĝestron. Ni poste ekaciis, ke la estraranoj forlasis la ĉambregon nur por iom forviŝi la akvon desur la pantalonoj kaj por forlavi ektimon per kruĉeto da biero.

Fine la publiko disiris kontente kaj ankaŭ mi en la rolo de reĝisoro dormis kviete, ĉar mi konvinkiĝis pri fidindeco de mia kolektivo.

Sed unu instruon mi tamen gajnis el tiu kazo. En tiuj irkonstacoj mi estonte estis ludanta nur komediojn.

---

## ESPERANTO ESTAS JAM NENENIIGEBLA !

Ju pli multe da tempestoj bruegas super ĝi, ju pli skvaj kaj fortegaj krizoj ĝin atingos, des pli juna kaj forta ĝi sin prezentos morgaŭ.  
Ĉar ĝi estas kiel Fenikso.

Karel Piĉ  
(Esperantista 1949, 9, p.71)

Ernesto Váňa:

## Nekrologo el kelkaj rememoroj

Forpasis la nuntempa plej maljuna kaj plej malnova esperantisto en Ĉeĥoslovakio, s-ano Karol Ladislav Cibur, en sia 100-a vivojaro, en Trávník, Moravio. Jen konciza informo, sed al mi ne indiferenta, ĉar dume reviviĝis en mia animo multaj rememoroj el ioraj jaroj, pri niaj renkontiĝoj, batalado kaj korespondado kun li, devenanta el malnova slovaka familia gento. Jen unu, la plej unua bildo pri nia plej unua renkontiĝo:

Tio okazis ĝuste antaŭ 60 jaroj, kiam mi estis "ireŝbakita" esperantisto kaj kiam mi konatiĝis kun la plej unuaj esperantistoj en mia tiama vivmedio, en la slovaka urbo Rimavská Sobota, kie mi tiam soldatservis ĉe la landlingardista elita bataliono. Tie mi trovis du simpatiantojn, kiujn mi reaktiviĝis, kaj ni komencis propagandi Esperanton kun tre bonaj rezultoj, dank' al s-ano Kola Ayasi el la Afrika Kongo; eble la plej malnovaj esperantistoj ankoraŭ certe rememoras lin, ĉar li poste prelegis ankaŭ en kelkaj pli grandaj ĉeĥoslovakaj urboj. El la ĉirkauaĵo mi menciis la iaman prezidanton de la Ĉeĥa EA, s-ron Vitek, kiu tiam junage aktivadis kiel faka instruisto en Tisovec, montara urbeto en regiono de Gemer. En tiu loko vivis ankaŭ bona esperantisto, vegetarano s-ano Krivosé kaj ambaŭ fariĝis miaj bonaj amikoj.

Laŭ Jarlibro de UEA mi konstatis, ke en montara regiono de Gemer vivas instruisto s-ano Cibur, kiu funkcias kiel delegito de UEA. Komprenible mi havis intereson povi renkontiĝi kaj konatiĝi kun li kaj jen - venis unika okazo, mi estis en lia proksimeco! Sed kiel realigi la renkontiĝon, mi ja estis tie en uniformo. Estis someraj ĉefmanovroj kaj mi deĵoris en la stabo, en speciala fako, foriri mi ne povis. Kaj jen tiam mi sukcesis havigi informojn, ke frumatene la "malamiko" preparas ĝeneralan atakon kontraŭ nian batalionon je la tria horo. Mi rapide decidigis. Mi tuj raportis al la komandanta ĝeneralo kaj mi petis lian konsenton, ke mi povu fari specialan taskon, malebligti la intencion de la "malamiko", laŭ mia plej bona imago.

Tio estis vespere. Mi tuj organizis el kuragaĵaj soldatoj grupon, en kiu estis ĉiuj infanteriaj armiloj. Mi ekinstrukciis ilin kaj preparis ilin por ĉiuj eblaj okazoj. Ni ekiris al nia tasko tuj noktomeze. Baldaŭ ni atingis la unuajn antaŭgardojn, kiujn ni "militkapitis", kaj de kiuj ni havigis la plej necesajn informojn pri la loko de ilia komandantejo, pri la ĝenerala stabo. Por mi valora estis tuj sciigi, ke la ĝeneralo dormas en la lerneja konstruaĵo, ĝuste ĉe s-ano Cibur. Do mia persona intereso estis veni kiel eble tien. Baldaŭ ni atingis la lokon en montara, arbara komunumeto. Miaj soldatoj eminente plenumis la riskan entreprenon.



Ekestis ega haoso, tondrado de grenadoj, de pafado, lumo de raketoj en la tuta tuta ĉirkauaĵo, kurado de la surprizitaj soldatoj-malamikoj kaj de la ĉevaloj, kiujn miaj soldatoj forpelis, do neeldirebla haoso, kriado - kaj en tia situacio mi ekirapis la fenestron de la lerneja konstruaĵo, kie en piĝamo aperis li - mia celo, s-ano Cibur. Mi nur per kelkaj vortoj salutis lin dirante, ke tiu ĉi tuta "komedio" okazis nur por povi lin ekkoni kaj saluti persone. Tuj haste mi aranĝis retiriĝon antaŭ ol povus la malamika regimento organiziĝi al reatako.

Kompreneble frumatene la Ĝenerala atako kontraŭ nin ne okazis kaj en la sama tago mi estis de la ĉefgeneralo altigita en pli altan rangon pro "heroea plenumado de la soldataj devoj"...

## -----

### Ni prezentas al vi la novajn estraranojn de SEA:

ing. Milan Zvara - prezidanto

Naskiĝdato: 29.4.1933

Esperantiĝo en la jaro 1948

Membro en SEA (AE SSR): 1969

Individua membro en UEA: 1970

Ĝisnunaj funkcioj: vicprezidanto kaj prezidanto de RK; prezidanto de EK Bratislava, Bardejov, Košice kaj Poprad; sekretario, vicprezidanto kaj prezidanto de SEA; sekretario de Monda Turismo, komitatano de UEA.

Asociaj honorigoj: bronza, arĝenta kaj ora insignoj de la Asocio.



Ján Göldrich - vicprezidanto

Naskiĝdato: 28.10.1933

Esperantiĝo en la jaro 1948

Membro en SEA (AE SSR): 1969

Individua membro en UEA: 1969

Ĝisnunaj funkcioj: prezidanto de E-klubo Handlová; membro, vicprezidanto kaj prezidanto de Regiona Komitato, membro de la Centra Komitato de SEA. Asocia honorigo: bronza insigno de SEA.



d-ro Ján Košický - vicprezidanto

Naskiĝdato: 8.9.1946

Esperantiĝo en la jaro 1966

Membro en SEA (AE SSR): 1979

Individua membro en UEA: 1987

Ĝisnunaj funkcioj: ano de ES; gvidanto de lingvistika komisiono de SEA; membro de la Centra Komitato de SEA; vicprezidanto de SEA.

Asocia honorigo: bronza insigno de SEA.



Ing. Jan Vajs - sekretario

Naskiĝdato: 21.6.1953  
Esperantiĝo en la jaro 1982  
Membro en SEA (AE SSR): 1982  
Individua membro en UEA: 1984  
Gisnunaj funkcioj: vicprezidanto de EK  
en L. Mikuláš; prezidanto de regiona RK;  
estrarano de la Centra Komitato de SEA.  
Asocia honorigo: bronza inaĝno de SEA



Ing. Magdaléna Feičicová - estraranino

Naskiĝdato: 26.12.1960  
Esperantiĝo en la jaro 1987  
Membro en SEA (AE SSR): 1987  
Individua membro en UEA: 1991  
Gisnunaj funkcioj: redaktantino de kluba  
bulteno; prezidantino de Fervojiŝta  
Sekcio de SEA; prezidantino de EK en  
Žilina.



\*\*\*\*\*  
**Societa kantareto reeldona**  
\*\*\*\*\*

Okaze de la 43-a kongreso de IFEF en Olomouc estas reeldona zorgo de ĈEA speciala kantolibreto sub la titolo Societa kantareto. La bone konata aŭtoro, profesoro Josef Cink en ĝi kolektis kantojn kiuj pluraj Esperantistoj jam konas kaj kantas dum siaj renkontigoj. Do, la kantareto estas bone uzebia ĝie, kie kunvenos kantemaj samideanoj kaj kie ekestos humoro kaj tempeto por ekkanti. Kompreneble vi tie trovos Fervojistan kanton, sed ankaŭ multajn aliajn "ĉiam verdajn" kantojn de la Esperantista publiko, kiel ekzemple Alaudeto, Saĝulo, Maryŝa, Dancu, dancu, Mia Bonnie, Certe venkos ni ktp.

Sume oni povas diri, ke proksimume duono (24) de la prezentitaj kantoj estis transprenitaj el la jam tute disvenditaj kajeroj de la Junulara Kantareto, ili estas bone konvenaj por la komuna kantado. En la novan kantareton estas elektitaj la plej ŝatataj kantoj. Pluaj kantoj (22) estas nove envicigitaj, plejparte ĝie nun ne publikitaj, kiuj estas destinitaj por tiuj kantemuloj, kiuj jam posedas la kajerojn de la Junulara Kantareto kaj volas kanti ion novan. Eble kelkaj el tiuj ĝi "novaj" kantoj almenaŭ laŭ la melodioj konate eksonos en viaj oreloj kaj provos akiri vian ekŝaton ankaŭ en la Esperanta traduko.

Do, la kantareto estas bone preparita, bone presita, kaj ŝajnas, ke ĝi bone servos Esperantistajn komunumojn, restas nur, ke ĉiuj kantemuloj havigus ĝin kaj kantu laŭ ĝi.

La kantareto kostas 24 kronojn kaj estas havebla de ĈEA.

J. Tomisek

## Antaŭ 70 jaroj okazis en Prago la 13-a Universala Kongreso de E.

En la tagoj 31.7. - 6.8.1921 gastigis la Slava insulo en Prago unuafoje kaj ĝis nun lastfoje Universalan Kongreson de Esperanto. La kongresa libro informas nin, ke partoprenis 2561 kongresanoj, el Ĉeĥoslovakio (1406), Germanujo (289), Svedujo (111), Francujo (91), Aŭstrio (83), Britujo (78), Nederlando (73), Polujo (72), Danujo (45), Hungarujo (45), Italujo (45), Bulgarujo (32), Svisujo (32), Jugoslavio (27), Hispanujo (27), Belgujo (19), Finnlando (14), Norvegujo (12), Rumanujo (11), Dancigo (= Gdansk - 6), Ruslando (5), Ukraino (5), Usono (5), Japanujo (5), Argentino (4), Litovio (3), Kanado (3), Aŭstralio (3), Estonujo (2), Turkujo (2), Kubo (2), Alĝerio (1), Sudafriko (1), Brazilo (1), Urugvajo (1).

Protektanto de la kongreso estis la ĉeĥoslovaka registaro. En la honora komitato figuris inter aliaj la ĉefministro dr. Jan Černý, ministro por eksterlandaj aferoj, dr. Eduard Beneš, prof. Václav Tille, verkistino Pavla Moudrá k.a. Siajn delegintojn sendis Ligo de Nacioj, hispana registaro kaj belga ministerio por sciencoj kaj artoj. La prezidento T. G. Masaryk sendis saluttelegramon.

En la loka organiza komitato ni legas la nomojn de J. Eiselt, V. Kraus, J. Šupíková, A. Pitlik, S. Kamaryt, f-ino Dlouhá, V. Címr, F. Novák, A. Bischitzky, F. Silha, B. Weiner, M. Moudrá, K. Hlaváčová, M. Lukáš, F. Kohout kaj V. Vondruška.

La kongreso estis ornatmita per la komedio de J. Vrchlický "Nokto en Karlův Týn" tradukita de universitata studento Miloš Lukáš, tiam 24-jara.

Okazis kunsidoj de Lingva Komitato (pri -acio, -ucio), de Sekcio por la Scienca kaj Teknika Vortaro (pri decimala klasado de le fakoj, pri tradukado de fakaj vortoj), de Sekcio por la Komuna Vortaro (pri H, -OID, preparo de la 3-a Oficiala Aldono al la Fundamento).

La kongreso estis malfermita la 31-an de julio, je la 14-a kaj 15 min. per komuna kantado de la himno kun orgeno.

S-ro Isbrucker, prezidinto de la antaŭa kongreso, malfermis la kongreson per rememoro pri la ĵus mortinta Antoni Grabowski kaj transdonis la vorton al la prezidanto de la kongreso, d-ro Stanislav Kamaryt. En la nomo de UEA alparolis la kongreson s-ro Privat kaj poste sekvis salutoj de 41 landoj. Salutan leteron sendis ankaŭ la fama franca verkisto Henri Barbusee.

Dum la unua laborkunsido (2.8.1921) estis pritraktata unuiĝo de ĉiuj E-organizoj sub la nomo "Universala Ligo Esperantista", poste la monokolekto por la monumento sur la tombo de d-ro Zamenhof kaj ebloj por enkonduki E-on en lernejojn. Oni proponis demandi registarojn, kion ili farus, se aliaj registaroj enkondukus E-on, kaj starigi komisionon, kiu rilatus kun la naciaj societoj kaj kun Ligo de Nacioj. Samtempe oni avertas ne proponi al la registaroj nematuran frukton (mankas instruistoj kaj lernolibroj).

Dua laborkunsido (merkredo 3.8.1921) akceptis rezolucion pri etarigo de Universala Ligo Esperantista (en kiu estus absorbata ankaŭ UEA - rim. Malovec) kaj petas komisionon verki statuton kaj financon planon.

La 4-an de aŭgusto okazis ekekurso al Moravia Karsto organizita de la Esperantista Klubo en Brno. Partoprenis preskaŭ mil personoj, tial ekestis organizaj problemoj kun tagmanĝo, biletoj por eniri grotojn ktp.

Vendredo (5.8.1921) alportis traktadon pri subteno de porblindula gazeto "Esperantista Ligilo" kaj bezonata monkollekto. Estis malaprobata propono starigi Esperantistan Internacian Eldonan Societon, ĉar oni konkludis, ke eldonado estas privata afero. La finnaj s-anoj proponis kunfandigi multajn deficitajn gazetojn en unu reprezentan, kiu kolektigus ĉiujn abonantojn. La propono estis parte aprobita, ĉar estis dezirinde malmultigi la nombron de la gazetoj, tamen estis decidite, ke ĉiu organizo rajtas

eldoni sian gazeton kaj neniu povas malpermesi tion. La laŭta sabata kunsido okupiĝis pri trouzo de la nomoj Esperanto kaj Zamenhof ĉe propagando kaj reklamo, pri neceso de unuforma prononco en ĉiuj landoj kaj pri proponoj de venontaj kongresoj.

La kongreso estis fermita per alvoko "Ĝis la revido en Helsinko!" kaj per kantado de "La Espero".

Miroslav Malovec



La kongresejo sur Slava Insulo

\*\*\* informetoj \*\*\* informetoj \*\*\*

RENKONTIĜO DE NAJBARAJ E-RONDETOJ

Sabate, la 20-an de aprilo 1991 realiĝis bela kunveno de Esperantistoj en Kunvald. Preparis ĝin Karel Ĉada el urbo Zamberk. Malgraŭ malfavora vetero kunvenis en intima penziono "Ĉe tilio" kvardek homoj - de infanoj ĝis Esperantistaj veteranoj.

Kun provizo de frandaĵoj por sovaĝa porkino nome Vendulka ni piediris al arbaro. Neĝis, vento blovis, sed ni atingis en ordo la domon de s-ro Egert, kiu zorgas pri Vendulka. S-ro Egert rakontis interese pri ĝi kaj pri aliaj bestoj. Sed niaj malsekaj ŝuoj plirapidigis nian revenon en varman penzionon. Atendis nin tie fabela tagmanĝo kaj nekredibla komplezo de personaro.

Post la tagmanĝo infanoj konkuris en kono de Esperanto kaj plenkreskuloj rakontis pri agado de E-rondetoj. Sekvis programo de infanoj en Esperanto: kantoj, poemoj kaj fabelo. Tre interesa estis sekvinta rakonto de estinta lernejestro s-ro Houdek pri historio de Kunvald kaj pri J.A.Komensky. Ne mankis tombolo, kiu dank al s-ano Kvido Janik aspektis kiel kabareto kaj ridigis ĉiujn ĉeestantojn. Ili eĉ ne volus disiri.

Ni rekomendos al ĉiuj homoj vizitu agrablan penzionon "Ĉe tilio" en Kunvald ĉe Zamberk. Kaj al gesamideanoj: ĉeestu niajn kunvenojn de najbaraj E-rondetoj el distriktoj Usti n. Orlicí kaj Svitavy! Estonta renkontiĝo realiĝos en Ĉeská Třebová.

Zdenka Novotná, E-rondeto Ĉeská Třebová

## FORUM—a omaĝo al Karolo Piĉ

FORUMO, internacia kultura revuo, n-ro 3/1990, 32 p. (red. R. Hauptenthal, Saarbrücken), dediĉis la tutan enhavon al Karolo Piĉ omaĝe al lia sepdejariga (1990). La enhavo: *Libro de ekstremoj* (La Litomiŝla Tombejo) de Osmo Buller, Finli.; *Ĉu eblas eskapi?* de Julian Modest; *Piĉ estas poeto* - de C. Minnaja; *Venkis la rakonta arto* - de R. Rosseti. Post specimenoj de nepublikigitaj poemoj de Piĉ sekvas omaĝoj de B. Ragnarsson ("Al vortoza virtuozo de la spacoj neregistritaj"; de M. Bouillon (tiu "ne povas tute senrezerve omaĝi lin", tamen "sufiĉe profunde estimas sian kolegon"); de Eli Urbanová ("Furoru plu, Karol' ... Erst, erst, erst / ho tio estos fest' / men, men, men / ni trinkos ĝis maten' !). H. Vatrás analizas esprimilojn en versoj de Karolo Piĉ; G. Kamaĉo recenzas la novaĵon de la omaĝato "La Bermuda triangulo" (novelaro). La kajeron fermas aŭtobiografia resumo de la sepdekjarulo.

Estas klare, ke Karolo Piĉ estas la plej mondkonata kaj la plej fruktorika ĉeĥa Esperanta literaturisto, kiu cetero rekonas sole la originalan literaturon. Kontraste, ne tiel en lia propra lando, kie oni konas nur liajn disse aperintajn poemojn kaj lingvajn eseojn. Ja - liajn verkojn eldonas eksterlanda eldonisto (Iltis) kaj tiuj en ĈSFR ne estas atingeblaj pro la prezaj kialoj. Jen la aperintaj verkoj:

La Litomiŝla Tombejo (1981 kaj 1989), Angoro (1982), La Mortsonorilo de Chamblay (1983), Obsedo (1984), Klacejo (1987), Naturalismo kaj Skemismo (1987), Urni et orbi (1988 kaj 1990), Frua pledo por la Iltisa skolo, Analizo de la revuo "La Esperantisto" (1989), La Bermuda Triangulo (1990). Pluaj verkoj atendas enŝranke. \*\*\*\*\*

(Aĵnoto de JaMa): Laŭaŭde K. Piĉ edziĝis antaŭ kelkaj jaroj kaj akceptis la nomon de sia edzino, sen anonco al la publiko. Ŝia nomo, lau FORUMO estas Onesorková. Do: Karel Onesork - civile, ni povas konkludi. Laŭfote, ŝi estas plaĉa mezaĝa virino, fotita kun la edzo kaj R. Hauptenthal. Kie? - Nu, kompreneble, sur la litomiŝla tombejo

JaMa.  
(majo, 1991)

P.S.: Se jam estas parolo pri Litomyšl, decas noti, ke alia samurbe naskita esperantisto, estinta juĝisto kaj poste deve encirka muzikisto, sukcesis eldoni en Nederlando (1988) sian romanon originale verkitan en Esperanto: Stefan Rubeníček: Sub Cirkotendo. (Ŝajnas, ke el tiu nun tutmonde konata urbo devenas Esperantaj verkistoj nur originale verkantaj...). JaMa.

## »»»»»» Korespondi deziras ««««««

### El Pollando:

\* Andrzej SZWANKE, ul. Orzechowa 50/13, 50-540 WROCLAW, 37-jara komercanto, kolektas monerojn, bankbiletojn, ankaŭ povas interŝanĝi poŝtmarkojn kaj bildokartojn \* Agnieszka MICHALAK, as. Piaszowskie 26/21, 67-115 BYTOM ODZANSKI, 11-jara komercantino  
 \* Joanna RUSEK, ul. Rynek 13/14/6, 67-115 BYTOM ODZANSKI, 11-jara komercantino, kolektas bildokartojn \* Renata CHAJDAS, ul. 1. maja 15/5, 55-200 OTAWA, 24-jara fraŭlino, komercantino, kolektas bildokartojn \* Darius ZEMLA, ul. Krakusa 1/9, 41-800 ZABRZE, 25-jara studento kun intereso pri turismo, kolektas poŝtkartojn, turismajn prospektojn \* Kazimierz CUINAR, Miechów 6, 56-202 WRONINIEC, 40-jara fraŭlo kun intereso pri poezio, moderna muziko kaj artoj, kolektas sondiekojn, kazetojn, poŝtmarkojn \* Teresa TABOR, ul. Długa 8/10, 32-065 KRZESZOWICE, 27-jara fraŭlino, instruistino kun intereso pri arto, literaturo, teatro, sporto \* Piotr PODKOCKI, ul. Barbary i Bogumila 6/6, 62-800 KALISZ, 22-jara studento, komercanto, li ŝatas turismojn \*



**RADOSŁAW SIENICKI**  
 SIENICA LIPUSY 15  
 PL 18-220 Czyżew



### El Francujo:

\* Jacques DONY, 3 bis, Rue Jean-Jaurés, F-42150, La Ricamarie, Franca instruisto serĉas gekorespondantojn por siaj 10-15 jaraj gelernantoj \*

### El Japanio:

\* Takahashi YOSHITERU, Nzgishi 2-3-3, Taito-ku, TOKYO 110, 44-jara oficisto el Tokya ĉarĝiĝis-haveno kun intereso pri folkloro kaj klasika muziko \*

### El Finnlando:

Rainer ARVOLA, Käräjätörmä 2 E 32, SF-33310 TAMPERE, komputisto, li ŝatas filmojn, vojaĝadon, klasikan muzikon, li volonte interŝanĝas poŝtmarkojn, bildkartojn, komputilajn programojn \* Tapani LAPPALAINEN, Kivalakotikylä, SF-37500 LEMPÄÄLÄ, 33-jara, li volas korespondi kun 10-12 jaraj geknaboj, interŝanĝas monerojn, bankbiletojn, poŝtmarkojn, fremdlingvajn gazetojn \*

### El Sovetunio:

\* Viktor DOCENKO, Kamčatskaja 9-2, 320009 DNEPROPETROVSK, 42-jara presisto, volas interŝanĝi gramofondiskojn \* Natalia VARODI, str. 50-jara Oktobro 11/14, SU-295540 VINOGRADOVO, Zakarp. obl., 17-jara mezlernejano el Ukrainjo \*

### El Ĉeĥoslovakio:

\* Boris UHER, Strakatého 17, 636 00 BRNO, 65-jara progresanto pri skoltismo, krom Esperanto ankaŭ germane kaj ruse \*

## Al la 76-a Universala Kongreso de Esperanto en Bergeno

Ni salutas la 76-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiun gastigas ĉijare la norvega urbo Bergen. La laponoj de Norvegio estas temo en la kongresaj diskutoj. La kongresanojn atendas teatra spektaklo Pupohejmo de H. Ibsen, riĉa muzika programo inkluzive de komuna kreaĵo de W. Auld (teksto) kaj C. Gates (muziko), Esperanta versio de la filmo "Reveno al Finnlando", 8 interesaj prelegoj pri la temo "Nordio - ĉu modelo?" Kaj ne mankas, kompreneble, riĉa libroservo, la Tagoj de la Libro, Lernejo kaj Paco, fakaj kunsidoj k.t.p. Inter kongresanoj de diversaj nacioj aperis plej multnombro poloj, estonoj, litovoj kaj latvoj, sed venas ankaŭ kelkaj personoj el Singapuro, Malajzio, Tajvano kaj aliaj aziaj landoj. El Ĉeĥoslovakio partoprenas precipe tiuj, kiuj aliĝis al la aŭtobusa ekskurso de la kooperativo INTERHELPO Praha.

Ni salutu la kongreson per poemo de František Branislav dediĉita al Norvegio kaj tradukita de Jiří Kořínek:



### Rememoro pri Norvegio

En ostaj brakoj de l' montara sol'  
la verdan nordon tenas pumili'.  
Kaj ĉe la fontoj dum parol'  
salutas lingva melodi'

Kiam solaj ni ekstaros,  
flustru el Ibsen reciton  
kaj bela urbo tie sub montaro  
sendos per vent' kaj lumoj inviton.

Kaj al ondoj spadon svingos forte  
ĉi lando spita, dieglavita fjorde.

---

rim.: pumilio (lat. pinus pumilio) - specio de Pino kun malalta trunketo kvazaŭ surtere rampanta

# Český esperantský svaz 110 01 PRAHA 1, Jilská 1

## \* STARTO \*

presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10,  
110 01 Prago 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare.  
Respondeca redaktoro: Miroslav Malovec,  
administrato: Ing. Karel Daněk, STARTO, poŝtiako  
425, ĈS- 660 25 BRNO 2, Ĉeĥoslovakio. Abonebla ĉe  
niaj perantoj, ĉe UEA aŭ rekte ĉe nia asocio.

---

Nepravideľný vĕstník Ĉeskeho esperantskeho svazu  
Vychází 6 x roĉně. Obdrží členovĕ svazu.  
Odpovědný redaktor: Miroslav Malovec,  
administrátor: Karel Daněk, STARTO, pošt.p. 425,  
660 25 Brno 2.  
Uzávěrka tohoto čísla byla 4.6.1991.

Tisk: Autokempink Strážnice



## NOVINOVÉ DOPLATNÉ

Dohlédací pošta Praha 07  
Snížený poplatek povolen  
Ředitelstvím pošt Praha  
j.zn. P/1-1267/79,  
ze dne 6.4.1979